


# PONTO ☆

*Jaro 3 N-ro 5 (20) Organo de Sunda Esperanto Agado okt. 2004*

## La 7-a SEA-kunsido

okazis la 2-an de oktobro 2004 en Kopenhago. Ĉeestis: Jytte Sunekaer gvidis la kunsidon, Kim Henriksen notis, Ileana Schrøder, Ina Schultz, Bent Jensenius, Karin Lindquist, Sten Svenonius, Per-Olov Johansson, Ann-Louise Åkerlund kaj Jill Hilford

**Raportoj pri atingoj de la pasinta SEA-kunsido:**
Sten Svenonius parolis pri la decidita komuna kongreso la 25-28-an de majo 2006 por KEM, SEF kaj DEA.
10 partoprenis esperantokurson en Kvarnby altlernejo gvidita de Sten .
Studrondo kiel ekkoni vian regionon okazis en Helsingborg.
Okazis lingva kurso por progresantoj en Selando en aŭgusto.
Komence de septembro okazis sabata kurso en Malmö.
Artikoloj pri esperantoaktivaĵoj, kiel eldono de nova disko de Esperanto Desperado kaj lingvoproblemoj, publikiĝis en "Kalundborg Folkeblad", "Information" gazeto de Frederiksverk.

DEA presis 2000 afiŝojn, ”Esperanto - det internationale kultursprog – www.esperanto.dk” kaj ankaŭ stokon de informflugfolioj kaj gluis respektive disdonis en Kopenhago.

**Raporto pri la informa laboro**
Sten informis pri la hejmpaĝa laboro www.agado.net.
KEK kompletigu sian paĝon per mapo montrante sian klubejon en la urbo.

DEA kune kun la pola ambasadejo aranĝos Zamenhof-feston en la pola ambasadejo 15.12.

Estis diskuto kiel la Sundaj Junuloj pli multe kunlaboru. En Kopenhago okazas en ĉiu 3a mardo renkontiĝo ĉe iu junulo. Kiel alogi la danajn junulojn al Svedio?

Sten parolis pri la problemo kion fari kun homoj kiuj, partoprenінте la sabatajn kursojn, bezonas daŭran instigon. Kelkaj havis la sperton ke ne estas bone kunpreni ilin al la kluboj, sed inviti ilin al aranĝoj, kiuj alogas ilin ekz. kursoj por komencantoj.
Al la klubo de KEK/DEFA venas 30-40 homoj regule. Oni ofertas diversajn aferojn.
Ni parolis pri kio informi al kiu. Ekz. al junuloj IS, IJK, KEF informoj pri retkursoj - Kim promesis fari leteron kiun Sten povas sendi al la novaj junuloj.
Estis diskuto havi labortagon pri informado en la regiono.

**Ponton** ni eldonos kvinfoje jare pro ekonomiaj kialoj laŭ propono de Jytte.

**Laborplanoj SEA dum la venonta jaro.**
1 - PONTO havu 5 numerojn
2 - Komuna kursplano - ekz. tuttaga instruo en januaro/februaro - Ann-Louise povus gvidi paroligan kurson en Malmö
3 - Trovi iun por instrui esperantoinstruistojn ekz. Lars Forsman. Ileana proponis ke ni dum unu monato esploru kiuj instruantoj ŝatus havi tagon kun Lars Forsman.
4 - Propono inviti Lars Forsman por labortago pri informado kaj prelego pri esperanto al neesperantistoj dum vendredo aŭ lundo, samtempe kun la semajnfino laŭ punkto 2 kaj 4.

**Informmaterialo.**
En www.esperanto.se oni povas trovi liston de informiloj en la sveda lingvo. Ĉu ideo por la danoj?

**Daŭrigo de la serio ekskurso kun prelego**.
La klubo en Lund pretas aranĝi tian ekskurson, kredeble iam dum la aŭtuno 2005.

**Venonta SEA kunveno estos en Lund la 12a de marto 2005 ĉe SENSUS, Krafts torg 12 a. je la 11-a h.**

Nästa **Ponto**, nr 6
utkommer ca 3 dec.
Skicka allt material till *Karin Lindquist*
senast den 19 nov.

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson:** *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20

Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Helen Claesson (desegnaĵoj), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado), Gertrud Lund.


ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 75 N-ro 5 (688)* >>Ĉiam antaŭen<< Fondita en 1906


**Ordinara kunsido 08.09**

La aŭtuna sezono komenciĝis per kunsido gvidata de vicprezidanto Per-Olov Johansson kiu bonvensalutis la ĉeestantojn.
Alf Mobark elektiĝis protokolkontrolanto.

**La aŭtunaj kursoj:**

La konversacia kaj literatura kurso komenciĝis la 13-an de septembro kun Kjell Persson kiel gvidanto.
Sten Svenonius gvidos kurson por komencantoj.
Oni decidis starigi specialan laborgrupon por aranĝi la jubilean kongreson 2006 kombine kun lingva studado unufoje monate.

Gertrud Lund informis pri la aŭtunaj programoj.

Anoj de komitatoj estas elektitaj laŭ jene:

**Kafkomitatoj:**

08-09 Gertrud Lund
22-09 Per-Olov Johansson
06-10 Karin Lindquist
27-10 Karin Lindquist
10-11 Elsy Lindblom-Vel kaj Albert Vel
08-12 Per-Olov Johansson

**Aŭtuna festo 16.10:**

Elsa Lindblom Vel
Albert Vel
Alf Mobark
Ulla Ullfors



**Informado 02.11:**

Per-Olov Johansson


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius* *sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77


**Komitato por aŭkcio 21.11**:

Gerd Rodén, Agneta kaj Gertrud Lund, Alf Mobark, Karin Rylander, Sten Svenonius

Karin kaj Sten informis pri la SEF-jarkunveno en Lesjöfors kaj pri la aktiveco de la SEF-estraro havigi monon por reteni E-centron en Stockholm. Inter alie oni starigis RONDO LANGLET. La ideo estas ke esperantistoj aliĝu sin kiel membroj en tiu Rondo kaj per aŭtoĝiro pagu 100 kr monate.

**Medlemsavgifter år 2005**
**<u>Se sidan 6</u>**
**Betala vid något möte i föreningen eller per postgiro 3 87 14-2, Malmö Esperantoförening (Agiften skall ej sändas till SEF:s konto i Stockholm)**
**Hyresbidrag till vår förening mottages tacksamt**
**kassören**
**Malmö Esperantoförening**

**Someraj memoroj 22.9**

Pro pluva vetero kaj intensaj spektaklaj sporteventoj en la televido la ĉeestantoj estis pli hejmemaj . Sed okazis esceptoj! Gerd dank´ al favora somerprezo de trafikkarto vizitis multajn vidindajn partojn de Skanio kaj povis ĝui i a belajn rozĝardenojn kaj interesajn ekspoziciojn. ekx. Signe Persson-Melin kaj Lennart Nilsson.
Ankaŭ mi esprimis mian ŝatatecon pri la verkoj de la du artistoj kaj montris kelkajn bildojn el la ekspozicioj.
Kjell faris mirindan vojaĝon helpe de Selma Lagerlöf al norda parto de Svedio kaj rerakontis la spertojn de la aglido, kiu pensas ke ĝi estas ansero. Gulli donis al ni el siaj enhavoriĉaj kongrestravivaĵoj memorojn pri personoj kun kiuj ŝi konatiĝis, ekz. Carla de Lorenzi el Torino

Per-Olov Johansson

**Hamburgo kaj Skotlando 6.10**

Unue Asta legis etan rakonton pri sia juneca vivo kun kamaradino en Gävle kaj Sandviken.
ŝi ankaŭ rakontis pri enhavoriĉa vojaĝo al Skotlando kune kun amikino. Ili faris plurtagan rondvojaĝon per aŭtobuso kaj vizitis i.a. Glasgow, Gail kaj Inverness kaj Lochness sed bedaŭrinde ili ne vidis la kolosan fenombeston de tiu lago.

Gertrud kaj ŝia filino Agneta vizitis la centjaran jubilean feston de la Esperantoklubo en Hamburg la 19an de majo. Je tiu jubileo la klubo eldonis bonegan historian libreton, kiun Gertrud transdonis al nia klubo.
Ili restis kelkajn tagojn en la urbo kaj vizitis plurajn muzeojn - Afganan muzeon, Germanan Doganmuzeon, la Spicmuzeon, ktp.
Entute tre interesa kaj enhavoriĉa vespero.

Åke Palm

**Aŭtuna festo 16.10**

Gastoj el Kopenhago, Helsingborg kaj Jönköping ĝojigis nin vizitante nian aŭtunan feston. Enkondukante la komitatanoj Albert, Alf, Elsy kaj Ulla regalis nin per bongustaĵoj, post kio Ileana Schrøder, Kopenhago, rakontis pri siaj spertoj de la 6-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Bilbao. Ileana havis multajn belajn bildojn de la urbo, kies plej konata konstruaĵo estas la Guggenheim-muzeo. Ŝi interese parolis pri la kongreso, kiu traktis i a la eŭropan identecon kaj la rajtojn kaj devojn pri interkomunikado en EU. Ŝi ankaŭ partoprenis en la laboro krei statuton por EEU. La venonta kongreso okazos en Maribor en 2007.



Estis agrabla vespero en gaja atmosfero.

Gertrud Lund



## Klubo Esperantista de Helsingborgo

**Karaj klubanoj (kaj eventualaj aliaj legantoj de tiu ĉi raporto)**

Depost mia lasta raporto mi partoprenis la 5-an sesion de la Interlingvistikaj Studoj en Poznano. Ĉirkaŭ dek el miaj studkamaradoj dum la venontaj du semestroj faros diplomlaboraĵojn pri lingvopedagogio kaj metodologio, kiujn ili defendos en septembro 2005. Tiam nova tri-jara ”rondo” de la studoj komenciĝos – kondiĉe ke aperas sufiĉa nombro da gestudantoj.

La klubo havis du ”dimanĉajn renkontiĝojn”, kvankam neniu en la ejo en Faktorsgatan. La 19-an de septembro ni vizitis nian klubanon Bernt Johansson en lia hejmo, kaj la 17-an de oktobro ni iris al la kinejo por kontroli ĉu ili vere parolas Esperanton en la filmo ”Populara muziko el Vittula”.
Jes, tion ili faras, sed ne same kiel en la libro. En la filmo ni vidas Niilan sidante antaŭ radioaparato ripetante ”Mi parolas Esperanton”. En la libro Matti lernas de Niila, kaj la lingvo fariĝas ilian sekretan lingvon. Nur post la apero de la afrika pastro en la preĝejo Matti ekscias ke la lingvo nomiĝas Esperanto kaj ke Niila lernis ĝin pere de la radio en la hejmo de Matti.

La filmo estas parte amuza, parte kortuŝa kaj kelkfoje iom timiga. Ĝi meritas viziton al la kinejo, ne nur pro tio ke ili uzas Esperanton. Gratulon al Anna Maria Lange, kies nomo aperas en la listo de kontribuantoj al la filmo!

Bedaŭrinde neniu el nia klubo havis la eblecon partopreni la interesan klubvesperon en Lund la 14-an de oktobro. Tiun saman vesperon mi ”devis” iri al Kopenhago, ĉar la prelego de Jens S. Larsen en la Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo havis la temon ”Lingvistikaj revolucioj”. Helpe de la komputila programo Power Point kaj tri junaj kunlaborantoj li prezentis la evoluon de la fako Lingvistiko kaj ok eblajn modelojn por respondi al la tri fundamentaj demandoj: Kie troviĝas la lingvo? Kial ni ekhavis ĝin? Kaj por kio ni utiligas ĝin? La prelego estis interesa sed eble iom tro altnivela por ordinaraj esperantistoj, kiuj ne studis lingvistikon.

Laŭ Barbro, Jill kaj Helga, kiuj partoprenis la Aŭtunan Feston en Malmö, la prelego de Ileana Schrøder pri la Eŭropa kongreso en Bilbao estis ege interesa kaj bone prezentita. Eble en alia loko en tiu ĉi publikaĵo vi trovos raporton pri tiu okazintaĵo.

Laste mi havas ĝojigan novaĵon. En Helsingborg grupo de personoj laboras por krei multkulturan ensemblon, kiu prezentos tiel nomatan ”mond-muzikon” ankaŭ en Esperanto.
Ni krucu niajn fingrojn por tiu projekto!



**Ĝis revido!**

**Ann-Louise**

---

## La Esperanto klubo de Lund

### Saluton al ĉiuj!

Dum nia septembra klubkunveno okazis vigla babilado pri someraj travivaĵoj. Tre interesa estis improvizita renkontiĝo, la 2-an de oktobro, kun japano, partoprenanto en kongreso por lingvistoj en Lund. Post vespermanĝo Kej-ĉan montris bildojn pri sia urbo Kyoto, festivaloj kaj Tokio. Ege imponis la nunaj teknikaĵoj - kiel ekzemple montri bildojn per portebla komputilo aŭ rapide konsulti enretan vortaron por serĉi forgesitan aŭ ne konatan vorton. Nome de LEK estis transdonitaj kelkaj libroj enhave ligitaj al Svedio.

Komenciĝis konversacia rondo kaj formiĝis grupo por traduki turismajn prospektojn. Laŭ peto de afrika amiko, scivola pri Olof Palme, Harry Engkvist sumigis la vivon de Palme. La teksto estas en la sveda kaj atendas tradukemulojn!

La oktobra kunveno estis tre agrabla. Tamen, la programo iom lamis: la anoncita filmo pri Lesjöfors ne pretis, prelegonto Kristina Takman havis sian unuan paneon kaj atingis nur ĝis Burlöv! Kaj, bedaŭrinde, tro multaj ne ĉeestis pro vojaĝoj, laboro, malsano. AML tamen plenumis sian parton de la programo rakontante pri Lesjöfors kaj la internaciaj someraj kursoj tie.



**Raportis Anna-Maria Lange**

# AKTUALA ESPERANTO-AGADO EN LA SUNDA REGIONO

**PONTO**
N-ro 5 2004

| | | |
|---|---|---|
| Lunde 08.11 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Merkrede 10.11 | KEM, Malmö | Ordinara kunsido. Tagordo Ponto nr 4 paĝo. 2<br>Poste Lingva kvaronhoro |
| Jaŭde 11.11 | KEKG, Kopenhago | ”Ekbruligis mi fajron en kor”. Pri la rusa blindula poeto Vasilij Eroshenko. Prelego de Alexander Kogan |
| Jaŭde 11.11 | LEK, Lund | Runoj kaj runlingvoj - Mårten Österlind |
| Lunde 15.11 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj, Numerludo |
| Dimanĉe 21.11 | KEH, Helsingborg | La studgrupo kunvenas |
| Dimanĉe 21.11 | KEM, Malmö | Aŭkcio.- Auktion. Se bifogad inbjudan<br>Tag med vänner och bekanta. Välkomna |
| Lunde 22.11 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Jaŭde 25.11 | KEKG, Kopenhago | ”1954-10.12-2004: La 50-jara datreveno de la Montevidea Rezolucio favore al Esperanto” Parto 1 (1946-1953) La historio malantaŭ la rekono de la Internacia Lingvo fare de UNESKO . Mogens Andersen rakontos |
| Lunde 29.11 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj. Zenon de Elea, greka matematikisto kaj filozofo en la kvina jarcento antaŭ nia tempokalkulo. Egon prezentos kaj poste diskuto pri liaj provokaj asertoj. |
| Lunde 6.12 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Merkrede 8.12 | KEM, Malmö | ”En resa till norra Indien med ABC- en studie i volontärt arbete”. Anneli Nilsson rakontos (svedlingve) kaj montros diabildojn. Försäljn. av varor från ABC - Världsbutik. |
| Sabate 11.12 | KEKG, Kopenhago | ”L.L. Zamenhof-festvespero” Detala programo poste |
| Lunde 13.12 | KEK/DEFA | Julmiko, kutima aranĝo |

## Nun en svedaj kinejoj

La longe atendita filma versio de ”Populara muziko el Vittula” de Mikael Niemi havis premieron. Kiel sciate, en la unua romano de Niemi, en la dua ĉapitro rolas esperanto, same kiel en la filmo.

Laŭpete de interesuloj mi sumigu kiel mi enmiksiĝis. En La Espero 2001:1 estis mencio kaj represo de la koncerna ĉapitro. La plejparte svedan tekston mi tradukis esperanten, por ĝin komprenebligi al alilandaj esperantistoj, kaj sendis la tradukaĵon al Niemi. Mi aldonis laŭdan rimarkon pri la tuta seneraraj esperantofrazoj. Mi tamen lin atentigis pri la ne same perfekta elparolo dum legado de la libro en P1.
Post jaro venis respondo de Niemi. Li kunsendis recenzon el Literatura Foiro (aprilo 2001) de Marianne Lund, Norvegio. Cetere estis ŝi kiu helpis pri tradukado.

En januaro 2003 Niemi telefonis kaj petis min korekti lian elparolon. Li intencis mem registri sian libron forme de aŭdlibro (eld. ĉe Pan Hörböcker och Norstedts, 2003)




En juli 2003 mi ricevis parton de la filmmanuskripto, por traduki la - en ĝi - tute ŝanĝitajn esperantofrazojn. En aŭgusto komenciĝis la filmfarado.

La finrezulton mi ne povas priraporti, ĉar mi ankoraŭ ne spektis la filmon.

**Ann-Maria Lange**

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

## Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.

La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

## La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.

Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h. en la ejo de nia studorganizo SENSUS, Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange,
Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt,
allan.ljungstedt@telia.com

## Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.

La kunvenoj okazos je la 14-a horo en Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund
tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe Barbro Haraldsson tel. 042-121471

## Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.

Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn tie. Prezidanto: Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk
tel. 0045-44 48 47 26

## Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG

Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport, salono n-ro 1, dua etaĝo.
Pordoj malfermitaj 19.00-23.00. Ĉiu prelego okazos ĉ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,
DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
rete: tsvendsen@webspeed.dk

## Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA

Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en Banedanmark, entreprise, Vasabygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krad)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@mail.dk
Kluba retadreso: defakek@hotmail.com

*Hejmpaĝo de SEA www.agado.net*

## UK i Vilnius 23-30 juli 2005

**Anmälningsavgifter (svenska kronor)**

| | -31/12-04 | -31/3-05 | 1/04 2005 |
|---|---|---|---|
| 1. Direkt medlem i UEA (ej MG) | 1380 | 1750 | 2115 |
| 2. Icke direkt medlem i UEA | 1750 | 2160 | 2580 |
| 3. Medföljande, handikappad eller ungdom (född mellan 75-01-01 och 84-12-31) som är medlem i UEA | 690 | 785 | 1060 |
| 4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är medl. i UEA | 1060 | 1290 | 1565 |

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 84-12-31 betalar ingen kongressavgift. Anmälningsblankett för kongressen kan beställas hos:
**Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby. tel 0415-50152**

**Blanketten skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till pg. 14 74 29-5, SEF, Specialkonto**

## Medlemsavgifter år 2005

Du kan välja mellan två kategorier av medlemskap (A), som innebär medlemskap i både Malmö Esperantoförening (MEF) och Svenska Esperantoförbundet (SEF) och
(B), som innebär medlemskap enbart i MEF

(A) **Medlem i MEF/SEF**

| | |
|---|---|
| **Medlem** (från 21 år) | **260 kr** |
| **Ungdom** (t.o.m. 20 år) | **140 kr** |
| **Familj** | **370 kr** |

Du erhåller La Espero och Ponto

(B) **Medlem i MEF**

| | |
|---|---|
| **Medlem** (från 21 år) | **150 kr** |
| **Ungdom** (t.o.m 20 år) | **60 kr** |
| **Familj** | **200 kr** |

Du erhåller Ponto

**Prenumeration på Ponto 70 kr.**
**Interreta membro 80 kr.**
(för icke medlem boende utanför SEA-regionen och tillhörande annan esperantoförening)